

La 14an de julio 2014

Rakontoj de rifuĝintoj en mia gubernio

La 29an de junio okazis la 53a Konferenco de Patrinoj de Gunma en mia urbo. Tiu patrina konferenco estis la gubernia, sed ĉiun jaron ie en Japanio okazas La Tutjapana Patrina Konferenco, kaj en ĉiuj gubernioj okazas la gubernia, kaj en multaj urboj okazas la urba. Ĝia historio estas jam longa, komenciĝinte tuj post la usona hidrogenbomba eksperimento en la atolo Bikini en suda Pacifika Oceano en 1954. La unua kaj la lasta Monda Patrina Konferenco okazis en Lausanne de Svislando en 1955. Japanaj patrinoj, kiuj partoprenis en tiu konferenco, komencis okazigi patrinan konferencon en Japanio, kaj tio daŭras ĝis nun.

Mia edzino estas respondeculo de la patrina movado en la gubernio Gunma, do ofte mi devas helpi ŝin diversmaniere. En tiu ĉi jaro mi estis mobiliziita kiel kunlaboranto de la fakkunsido «Ni ne forgesu Fukuŝima-on, Ni kunlaboru kun Fukuŝima». En tiu kunsido partoprenis rifuĝintoj en mia gubernio el Fukuŝima. La rakontoj estis tre kortuŝaj kaj mi ne povis aŭskulti ilin sen larmoj. Mi notos ilin sube.

Rakonto de s-ino K.

S-ino K. loĝis en la urbo Namie antaŭ la katastrofo, sed nun rifuĝis en la urbo Annaka en mia gubernio Gunma. Ŝi naskiĝis kaj kreskis en tiu urbo Annaka ĝis sia edziniĝo. Do helpate de siaj gepatroj kaj parencoj, ŝi translokiĝis al la urbo.

Sur la blanka tabulo en la kunsidejo ŝi montris kelkajn fotojn. Ŝia eksa domo estas nun kovrita de herboj. Eble ratoj nun loĝas en ĝi. Inter la fotoj estis tiu de ĉinaj geknaboj, kiujn la ascio, al kiu ŝi apartenis, invitis. Ŝi agadis vigle en sia distrikto. Foje ŝi larmis, klarigante pri la fotoj. Vidante ŝin, ankaŭ mi larmis.

Por tiu ĉi fakkunsido, ŝi anticipe demandis siajn rifuĝintajn amikojn pri la nuna vivstato.

S-ro A: Por fari novan karton en superbazaro, ni bezonas tempon, ĉar kiam

oni scias, ke mi estas rifuĝinto, devenanta de Fukuŝima, oni demandas min pri diversaj aferoj, ekzemple pri miaj familia konsisto, loĝloko, bankkajero ktp. Ofte okazas tiaj malgrandaj ĝenaĵoj kaj en tiaj okazoj mi ĉiam sentas pikon en mia koro.

Mi ne povas konfesi mian veran senton al miaj ĉirkŭaj homoj, timante, ke ili miskomprenos min kaj ili havos malbonan impreson pri Fukuŝima. Ĉiun tagon pro malgrandaj aferoj mi ŝanceliĝas.

S-ino B: Reveni aŭ ne, tio estas grava kaj turmenta problemo. Pli multaj homoj suferas nun pro melankolio, ol antaŭe. Mia urbo Namie estis dividita en tri kategoriojn laŭ la grado de poluiteco, sekve diferencis sumo de kompensa mono kaj aliaj kondiĉoj. Pro tio inter la urbanoj, eĉ inter parencoj ekestis muro.

S-ino C: Mi ĉesis paroli pri mia stato al miaj novaj konatoj ĉi tie, ĉar ŝajnas al mi, ke ili ne povos kompreni min. Ili pensos, ke mi simple grumblas.

En la urbo Iŭaki, kie nun loĝas multaj rifuĝintoj, okazas konflikto inter ili kaj la urbanoj. Tiuj ĉi plendas, ke pro tiuj novaj enmigrintoj okazas trafikaj ŝtopiĝoj, hospitaloj estas ĉiam plenaj de pacientoj ktp. Iuj eĉ mokis rifuĝintojn per jenaj aĉaj vortoj: “Almozulo de TEPCO”.

Mi nun provizore loĝas en la nuna loko, sed se mi translokiĝos plu, mi devos mem pagi elspezon por tio, ĉar laŭ la regulo TEPCO aŭ la registaro pagas nur unufojan translokiĝon pro la nuklea akcidento. Antaŭe ĉiuj miaj familianoj loĝas kune, sed nun ili loĝas en tri apartaj lokoj, tial mi suferas finance multe.

S-ino D: Komunumoj en mia urbo rompiĝis. Antaŭe mi estis unu el la membroj de Legkunsido, en kiu la membroj voĉlegis librojn al infanoj, sed tiuj membroj nun dise loĝas en la tuta Japanio. Ĉu mi povos agadi same, kiam mi revenos al Namie? Farante al mi tiajn demandojn, mi ĉiam ŝanceliĝas. Perdinte vivcelon, mi perdis ankaŭ memkredon kaj vivkontenton.

S-ino E: Mi aĉetis malnovan domon. Iuj homoj diras al mi: “Vi certe ricevis multan kompensan monon”. La fakto estas tute alia, sed multaj homoj kredas tiamaniere.

S-ino F: Mia 90-jara patrino fariĝis pli demenca. Ja ŝi estis demenca ankaŭ antaŭe, sed tiam ŝiaj amikoj ofte vizitis ŝin. Ŝi vivis preskaŭ normale, sed post kiam ni rifuĝis en Tokio, loĝante en apartamento, ŝi komencis vagi. Fariĝis tre malfacile prizorgi ŝin tagnokte, kaj mi foje volas, ke ŝi

mortu, aŭ eĉ mi volas mortigi ŝin. Mi estas tre malĝoja kaj havas peksenton pro tio, ke mi havis tiun aĉan volon al mia patrino.

S-ro G: Oni riproĉas min pro tagon vetludas en paĉinko-ludejo.* Sed se tutan tagon, mi povus aŭ alkoholisma, ĉar mi por fari hejme. Por eviti paĉinko-ludejon.



tio, ke mi ĉiun

mi estus hejme fariĝi melanklia havas nenion tion, mi vizitas

*paĉinko : Vidu la foton.

S-ino Ĝ: Mi memvole rifuĝis* en Gunma kun miaj gefiloj. Miaj bogepatroj, kiuj ne rifuĝinte plu loĝas en Fukuŝima, pli kaj pli forte rekomendas, ke mi revenu. Mi komprenas, ke ili volas renkonti miajn gefilojn, sed mi timas radioaktivecon tiel multe, ke mi ne volas reveni. Mi kaj mia edzo aparte loĝas, do povos okazi eksedziĝa problemo.

* Loĝantoj en la kolora zono fuĝis laŭ la ordono de la registaro. Ili estas devigataj rifuĝintoj, do rajtas ricevi kompensan monon. Loĝantoj ekster la zono ne estis



ordonitaj fuĝi, do eĉ se ili rifuĝis memvole en alia urbo, ili ne povas ricevi kompensan monon. Tiu divido estas tute ne logika, kaj kaŭzis malfacilon al memvolaj rifuĝintoj kaj malharmonion inter la loĝantoj.

Rakonto de s-ino H. el Namie:

Mi perdis mian domon en la urbo Namie pro la cunamo. Unu jaron post la katastrofo mi fariĝis melankolia. Mia kuracisto diris, ke mi ne tro eltenu, kaj mi fariĝis iom bona, sed dume mia filino, vidante, ke mi estas malsana, eltenis multe kaj fariĝis malsana. La guberino Fukuŝima ekzamenis ĉiujn gelernantojn pri tiroido kaj oni trovis, ke mia pliagxa filino havas malgrandan pustulon ĉe la gorĝo. Oni diras, ke ĝi ne estas serioza, sed mi estis tre maltrankvila dum unu jaro, ĝis oni konstatis, ke ĝi malaperis. Dum tiu unu jaro mi riproĉadis min multe, ĉar mi pensis, ke pro mia senatenteco mia filino elmetiĝis al radioaktiveco. Mia maltrankvilo ankoraŭ ne tute malaperis, ĉar mia filino devas ricevi ekzamenon ĉiun duonan jaron.

En la fiŝhaveno Ukedo de la urbo Namie oni foje trovis fiŝon kun du bostoj. Mi pensas, ke radioaktiveco el la nukleaj centraloj de Fukuŝima estas la kaŭzo. Mi sentis nebule danĝeron de la nukleaj centraloj. Fakte la problemo okazis jam antaŭe, sed ni neglektis ĝin, kvazaŭ nenio serioza okazus.

Rakonto de s-ino I. el la urbo Iŭaki

Iu knabo de la 3a lernojaro, kiu rifuĝis en iu urbo, aŭdis en la klaso, ke infanoj de Fukuŝima malsaniĝos, kiam ili kreskos. Reveninte hejmen, li demandis sian patrinon, ĉu li povos fariĝi plenkreskulo.

En Fukuŝima “nenio ŝanĝiĝis, nenio komenciĝis kaj nenio finiĝis”. La ĉefministro diris en la lasta jaro, ke la poluita akvo en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima estas sub la kontrolo”, sed tute ne! La kapo de la popolanoj estas sub lia kontrolo!

Rakonto de s-ino J. de Iŭaki

Antaŭ la katastrofo mi loĝis en la urbo Iŭaki kun miaj edzo kaj du gefiloj modesta sed feliĉa. La 11an de marto okazis grandega tertremo, do ni rifuĝis en la najbara gimnastikejo, kaj poste mi aŭdis, ke en la nuklea centralo okazis eksplodoj. Mia amiko, kiu laboris tie, rekomenids, ke ni tuj fuĝu, ĉar el la centralo tralikiĝas radioaktivaĵoj, tamen ni ne havis rimedon por fuĝi, ĉar al ni mankis benzino. Mi pasigis kelkajn tagojn en mia hejmo tre maltrankvile, sed fine ni povis havi benzinon kaj fuĝis al la gubernioj Ibaraki kaj Toĉigi, loĝante en hoteloj kaj loĝejoj. Dum tiuj neordinaraj tagoj mi sentis pli kaj pli da streso.

Timante malbonan influon de radioaktiveco al sano de miaj gefiloj, ni translokiĝis al la gubernio Gunma, sed estante graveda kaj havante malgrandajn gefilojn, loĝi en rifuĝejo estis tre malfacile, do ni revenis hejmen en Iŭaki. Tamen baldaŭ mia filino foje nazsangis nokte kaj en lernejo, do mi pli kaj pli maltrankviliĝis pro radioaktiveco. Mia edzo ne povis lasi la urbon pro sia laboro, do ankaŭ mi restis kun li, sed unu jaron poste mi sukcesis trovi loĝejon en Gunma kaj translokiĝis kun miaj gefiloj, lasinte mian edzon hejme.

Vivi en fremda loko estis tre malfacile, kaj krome ĉar mi estas memvola rifuĝinto, mi ne povis ricevi kompensan monon. Mi devis pagi ĉion el mia malgranda poŝo kaj tio pli maltrankviligis min. Mia filino estis tre gaja

antaŭe, sed en lernejo ŝi ne estis bone akceptita de siaj klasanoj, tial ŝia karaktero ŝanĝiĝis. Mi afliktiĝis pro malbona sanstato de miaj gefiloj, manko de mono kaj espero, kaj mi apenaŭ vivis.

Mi forte postulas, ke TEPCO kaj la registaro petu pardonon ne nur de miaj gefiloj, sed ankaŭ de ĉiuj infanoj kaj geknaboj de Fukuŝima. La akcidento de la nuklea centralo minacas nian vivon kaj estontecon de ĉiuj infanoj.

La ministro de medio kolerigis popolanojn

La 16an de junio la ministro de medio s-ro Išihara Nobuteru diris al la ĵurnalistaro rilate al la provizora konservejo de nukleaj poluitaĵoj konstruota en la regiono Futaba de la gubernio Fukuŝima : « Fine temos pri monsumo ».

Aŭdinte lian diron, multaj popolanoj koleriĝis.

S-ino Nemoto Tomoko, 66-jara, kies domo estas en la urbo Ookuma, kolere diris: « Mi atendis hejmenrevenon dum la pasintaj 3 jaroj, tamen se la konservejo estos konstruita en mia urbo, mi estos forpelita de la urbo kaj neniam povos reveni hejmen. Li tute ne komprenas nian malĝojon ».

S-ino Moriguĉi Sumie, 71-jara dommastrino, diris: « Ni devas forlasi niajn domon kaj kampon hereditajn de la prapatroj. La ministro ne komprenas nian afliktiĝon pro tio. Ni ne postulas monon. Ni nur volas reveni hejmen. Ni nur volas reakiri nian antaŭan vivon ».

Solvi ĉion per mono estas la kutima maniero de kapitalismo. Sammaniere TEPCO kaj la registaro silentigis kontraŭajn loĝantojn per mono kaj konsentigis la konstruon de nukleaj centraloj. Ili ne havas volon sincere solvi problemojn kaŭzitaĵojn de la akcidento, sed ili opinias, ke fine mono parolas/efikas.

Respondo el Fukuŝima

Mi dissendis mian raporton pri mia vojaĝo al Namie, kaj venis respondo de unu el la esperantistoj en Fukuŝima.

Estimata s-ro HORI,

Ni, loĝantoj en la urbo Fukuŝima, scias, ke multe da radioaktiveco

detektiĝas sur la monto Ŝinobu kaj multaj el ni jam ne vizitas ĝin, kvankam ĝi estis de ni ŝatata loko por promeni.

La cifero $10\mu\text{Sv/hore}$ tamen ne surprizas min, ĉar mi jam detektis preskaŭ tiom da radioaktiveco en mia tereno; 10 centimetrojn supre de kloako. Malgraŭ tio, ni devas ne ignori tion. Mi denove avertis min pri tio, leginte vian raporton.

HORI JASUO